2-a Jaro, N-o 5 (57) APERAS S.A.T. SEMAJNE 29. Oktobro 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Korespond-adreso: "Redakcio de Sennaciulo", Colmstr. 1, Leipzig-Stö. (Germ.) | Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

## LUKTADO POR RAJTOJ

La homaro jam de longa tempo sopiras al rajtoj kaj justeco kaj konsideras ilin fundament-kondiĉojn kiel la feliĉon kaj bonfarton de ĉiu aparta familio, eĉ de la tutaj popoloj. La homaro konscias, ke ordo kaj paco povas esti nur en la lando, kie la rajtoj kaj justeco okupas la plej altan staton.

Nekalkulebla estas la nombro de ti-kiuj sian tutan spiritan forton oferas kaj oferis por tiu alta celo, de la tempo de orientaj scienculoj, de verkistoj de l' antikvaj leĝtabeloj, de instruistoj pri leĝoj kaj rajtoj ĝis la gvidantoj de l' nuntempa moderna profmovado. Servi al tiu celo volis ankaŭ antaŭ multaj centjaroj jam la konfesioj kun miloj da siaj predikantoj, por ĝi batalis kaj batalas ankoraŭ nun oferante sian havaĵon kaj sin mem tiuj idealistoj, kiuj eliris el la labora popolo mem dum nuna kultura evoluo; por ĝi luktadas milionoj da premitoj kaj sklavigitoj.

Ĉi-celon al kiu ĉiuj sopiras, malhelpas atingi unu malamiko: la homo, la plej ĉarma kreitaĵo de la mondo, kun sia inteligenteco, fanfaronemeco, superec- kaj havaĵavidemeco. Ju pli altranga homo, despli fia mondkoncepto. Ne sufiĉas, ke la homo servigas al si ĉiujn naturfortojn, landojn, bestojn, ĉiujn teknikajn kaj kulturajn atingaĵojn por havigi nutraĵon, kun kiel eble plej malgranda peno. Li volas rikolti sen laboro. Li volas ĝui la belecon de la vivo, kontentigi ĉiujn siajn revojn kaj dezirojn, kaj sen penoj akiri ĉi-rimedojn. Li volas regi, riĉiĝi kaj pli multe akiri ol lia salajro permesas.

Li povas tion atingi sole, se li senfruktigas la penojn de sia kunhomo, se li premas kaj subigas lin, ĉu ĉi-tio kaŭzas malprofiton aŭ ne. Por atingi sian celon la homo eluzas ĉion: parollertecon, mensogojn, trompadojn, potencon kaj influon kaj dank' al kio la homo antaŭ cent jaroj jam sukcesis enkonduki sklavigon. Siajn kunulojn li estigis obeemaj subuloj, li ruzigis veran sencon de la religio, por ke kun helpo de fipredikantoj, inkvizicio, subpremo de popoloj akiri la mond-potencon kaj riĉaĵojn. En nomo de dio-volo kaj de dio enkondukita mondordo oni laŭdis ĉion, kio servis al mondpotenculoj por sklavigo de popolamasoj, por ke la lastaj pacience toleru siajn suferojn kaj mizerojn, dum la unuaj povu trankvile kaj sen malhelpo ĝui sian akiritan profiton.

La homaro kontraŭbatalanta ĉi-sangsoifulojn kaj post malfacila batalo ekopiniinta, ke la fihomoj jam estas forbalaitaj kaj ke la libereco, justeco kaj bonfarto jam akiritaj, treege eraras, ĉar la fihomo sukcesas denove sklavigi ĝin per aliaj novaj rimedoj.

Sub protekto de la potenco kirasita de kapo ĝis piedoj, prigardata per leĝo servanta al liaj celoj, la kapitalismo daŭrigas elsuĉi kaj eluzi la popolojn. La mondo sangas el mil vundoj, batitaj de la nuna sociordo; ĝi ĝemas kaj turmentiĝas enkatenigita kaj subpremita de la malamikoj de l' justeco kaj rajtoj.

La sklavigita proletara maso devas esti inspirita je nova forto, kuraĝo kaj luktadvolo. Do, malaperu la malnova egoismo kaj anstataŭu ĝin la organizacio, kies celo estu atingi rajtojn kaj justecon nur per socialismo. La pli altaj sociaj klasoj; ili semas nur malamikecon kaj malkonkordon, tamen la popolamasoj, la laboristaro konscia parto de la homaro sentas sin tro trafita, se la konscienco ĝia estas tuŝata de tiuj, kies devo estas laŭleĝe gardi iliajn rajtojn.

Kara kamaradaro, enprofundiĝu do kaj certiĝu, ke ĉio dependas nur de vi mem. Helpu krei fortikan kaj nevenkeblan mason batalpreta kontraŭ maljustecplena kapitalismo. Via celo estu *fortika organizacio unueca* kun principo: "rajtoj devas esti rajtoj!" *Neŭtralulino.*

## Spertoj el Sud-Afriko

En sia raporto post ĉi-printempa vizito de Sud-Afriko, la parolanto traktis Natalon kaj ĝian rasan problemon. Antaŭ multaj jaroj loĝantoj bezonis malkaran laborforton, tial ili importis hindajn kuliojn al Sud-Afriko, kiuj tie laboris plimalkare ol la blankuloj. En Natalo estas 140000 de tiuj hindaj kulioj, kaj ilia malkara laborforto subminas la civilizon de tieaj blankuloj. Ili deklaras, ke ili estas britaj regatoj, ke la plej granda nombro da ili naskiĝis en Sud-Afriko, kaj ke ili volas resti tie.

Ili rifuzas akcepti la registaran proponon reeniri la patrion kun ekstra pago por ĉiu po 10 £.

La Aziano vivas je nivelo en kiu la Eŭropano ne povas ekzisti. La britaj kaj holandaj kapitalistoj profitas je tio kaj preferinde dungas ilin anstataŭ iliajn blankajn konkurantojn. La loĝantoj de Natal plue akuzas la hindojn, ke iliaj specifaj kutimoj kaj lokoj kie ili vivas, estas minaco al publika sano. La parolanto ne konsentas, ke estas necese aŭ juste, apartigi rason, sed estas tuta vero, ke se ne okazos ŝanĝo, ekzistas la danĝero, ke la blanka civilizacio en Sud-Afriko pereos, parte pro hindaj kulioj kaj parte pro la indiĝenoj. Por ke blankuloj povu vivi laŭ sia civilizacio, la solvo estas ekonomia, tio estas, doni al la indiĝeno kaj hindo la saman rekompencon kiel al la blankulo por sama laboro.

Sud-Afriko abundas en rasaj problemoj, sed ili estas tute malsamaj ol la problemoj en aliaj anglaj kolonioj, kiel Kanado aŭ Novzelando, kie la maoroj rapide malaperas.

Estas interese scii, ke Afriko ricevas sian nomon pro la fakto ke en 145 a. K. la romanoj venkis Kartagon kaj faris ĝin la ĉefurbo de nova kolonio, kiun ili nomis Afriko.

En Sud-Afriko estas diversaj, rasaj devenoj. Laŭ historia ordo oni trovis, ke la buŝmenoj estis la primitiva tipo de loĝantoj en Sud-Afriko. Tiuj estis sekvitaj de la hotentotoj, paŝtista popolo, kiuj laŭvice estis sekvitaj de la bantua raso, dividita en kelkajn tribojn: zuluoj, svazioj kaj natabeloj. La raso bantua venis el la centraj montoj de Afriko proksimume antaŭ tri aŭ kvar jarcentoj. La tradicioj de zuluoj diras pri severaj metodoj uzataj de unu el iliaj estroj por plibonigi la korpan forton de lia popolo. Li altrudis la plej malfacilajn devojn al siaj viroj, kiuj postulis ilian tutan forton kaj toleremon. Tiuj, kiuj malsukcesis, estis senkompate mortigataj; kaj ĝis nun, la zuluoj reverencas la memoron de tiu ĉi estro, kiu plialtigis la prestiĝon de sia raso.

Ĉirkaŭ la provinca kapo troviĝas granda nombro de diversaj kolorhaŭtaj popoloj miksitaj de blankuloj kaj nigruloj; kaj tiuj malfeliĉuloj estas malestimataj de la blankuloj kaj de nigruloj. Estas certe eraro de la flanko de blankuloj trakti tiujn ĉi homojn kiel pariojn, ĉar en okazo de konflikto estonte inter la blankaj kaj nigraj rasoj en Sud-Afriko, tiuj kolorhaŭtuloj povus certe esti utilaj pro siaj cerboj kaj estreckapablo. Plue estas la problemo de la "malriĉaj blankuloj", la idaro de holandanoj, kiuj dum la frua tempo de la kolonio posedis grandajn bienojn, sed kiuj, pro grandaj familioj kaj daŭra plua-dividado de la tero inter si, atingis nun teruran staton de malriĉeco.

Ankaŭ estas tie la 160000 hindoj el kiuj 140000 troviĝas en Natalo. Rezulte tiu ĉi intermiksaĵo de rasoj estas vera socia problemo, kies gravecon estas ne facile taksi. Ĉiuj ili devas vivi kune sub unu registaro. La problemo estas — ĉu tio estas ebla. La ĉefa problemo de Sud-Afriko estas tiu de raso bantua. Ne estos troigo diri, ke la blankuloj de Sud-Afriko estas en konstanta timo kio okazos al ili. La ekonomia milito, kiun la blankulo timas, estas, li diras, pro tio, ke li instruis al la nigrulo siajn artojn, kaj nun la nigrulo malkarigas tiujn ĉi artojn je malprofito de la blankulo. La ordinara perlaboro por la nigrulo estas unu ŝilingo kaj naŭ pencoj tage, kaj dek ŝilingoj monate en terkulturaj distriktoj. Estas konflikto rasa tie, kaj oni ne povas antaŭvidi la estonton. Ŝajnas, ke Sud-Afriko estas lando ne de blankuloj, sed de nigruloj. La nigra loĝantaro pligrandiĝas rapide, dum la blanka restas preskaŭ senprogresa. Tamen la blankuloj de la angla raso faras sian eblon por solvi la problemon kaj surteriĝi tie kun sia civilizacio.

Laŭ raporto de H. Snell kompilis k-do *Gearry.*

## *INTER NI*

*Karaj legantoj — kunlaborantoj. — En la antaŭa numero de "Sennaciulo" la Ekzekutiva Komitato de SAT parolis al vi pri fondiĝo de "Redakci-komisiono". Hodiaŭ vi bonvolu permesi, ke la koncerna Red. Kom. paroletu al vi. Ĉar nia intenco estas levi la abonantnombron al antaŭa nivelo per objektiveco kaj bonaspekteco de nia "Senn.", via absoluta kunhelpo estas nepre necesa. Pro tio ni konstante interrilatu reciproke en bona harmonio. Niaj kunlaborantoj prezentu tion, kion niaj legantoj prefere deziras.*

*La komunikaĵoj pri Sovet-Unio, senditaj de niaj rusaj k-doj kunlaborantoj, kvankam kutime objektiva materialo kaj eĉ ne tuŝanta partitendencon, naŭzas al multaj kvazaŭ ruĝa tuko al virbovo. Ili eĉ preferas forlasi nian SAT-movadon anstataŭ kunlabori. Se vi deziras, ke niaj sovetaj k-doj ne rezervu la hegemonion en nia presorgano, estas necese, ke vi klopodu al kunlaboro.*

*Efektive, la fakto ĝis nun estas konstatebla, ke ili estis kaj estas la plej aktivaj en nia movado. Provu surpreni la konkuron! Via presmaterialo inundu la redaktejon.*

*Nur per tio ni atingos nian celon, ke la Proletaro unikfronta marŝu komune kontraŭ la sola malamiko — Kapitalismo.*

*Pasis la periodo, kiam Vien-aj SAT-anoj marŝis ĉe la pinto, kaj post ili sekvis la Leipzig-aj. En nuna momento aliaj sukcesis venki la konkuron.*

*Niajn legantojn ni demandas: Kion vi preferas plej volonte legi, kaj kio ne plaĉas al vi. Oni nepre diskutu en grupoj tiun ĉi temon kaj ili respondu kolektive. Tiuj kolektivaj respondoj estas publikigotaj.*

*Al niaj kunlaborantoj ni diru, ke ili verku objektive, senparti-tendence, senpolemike kaj raportu koncize (ĉar precipe tute koncizaj raportoj mankas kutime en la redakcio).*

*Poste ĉiuj facile povas, kun niaj organoj en la mano, varbi abonantojn kaj membrojn por SAT.*

*Do, kamaradoj! Bonvolu konsideri la gravecon de nia tasko. Nur bona harmonio reciproka garantias sukceson.*

*Red. Kom.*

## Survoje al Laborista Radio-Internacio

Vizitinta dum la pasinta somero Sovet-Union germana laborista delegitaro faris netakseblan servon por nia movado. Radioamatoroj — membroj de la delegitaro, helpis al ni organizi proksiman interligon kun apenaŭ evidentiĝanta ankoraŭ laborista radioamatora movado en Germanio kaj per tio ebligis komencon de nia internacia laboro.

Pretekstoj por tia laboro ekzistis ankaŭ pli frue: ni havis invitojn al la Internacia Radiokongreso en Parizo kaj ankaŭ al la Radiokonferenco, kunvokita de la Konsilantaro de Ligo de Nacioj en Svisio. Sed ni konscie ignoris ĉiujn ĉi invitojn, konsiderante, ke same kiel ni nenion havas por lerni ĉe la burĝaj "amikoj de radio", tiel ankaŭ por ili nenion agrablan povas prezenti kontaktiĝo kun la movado, laboranta sub la standardo de batalanta proletaro.

Ni ĉiam estis certaj, ke pli malpli frue en la alilanda radioamatora movado evidentiĝos siaspeca laborista devojiĝo, t. e. la movado por la utiligo de radio, kiel de unu el la rimedoj en la batalo por la kultura disvolvo de laborularo. La ekzemploj de simila skismo en la historio de sporta kaj esperanta movado klare montris, ke ne povas ekzisti eksterklasa kunlaboro por la objekto, kiu mem estas ilo de la klasa batalo.

Kaj la radio sendube havas ĉion necesan por fariĝi tia ilo. La okcidenteŭropa burĝaro bonege tion komprenas kaj surbaze de tio konstruas sian politikon, reduktiĝantan al la celo deteni, prokrastigi la intereson de laboristoj al tiu ĉi "danĝera ludilo".

Sed la nekoruptebla historio plenumas sian aferon kaj la laborista radioamatora movado iom post iom fariĝas reala fakto. La unua komenco estas farita en Germanio kaj la "merito" en tiu fako apartenas ĉefe al la germana registaro mem, kiu per tuta aro da drakone krudaj rimedoj, direktitaj kontraŭ la laborista radioamatora movado, plej bone akcelis evidentigon de ĝia klasa esenco en koncepto de laboristoj.

Estiĝinta antaŭ unu jaro Laborista Radioklubo en Berlino prezentas nun sufiĉe multenombran organizaĵon, havantan siajn filiojn en plimulto de industriaj centroj. Kun kelkaj el tiuj ĉi filioj ni jam havas konstantajn korespond-rilatojn kaj la ricevataj materialoj pentras al ni jenan bildon:

Radio estas en Germanio ŝtata monopolo, kiu efektiviĝas pere de speciala societo, unuiganta la poŝt-ministerion kaj la industrion kaj disponanta jaran enspezon de 12—14 milionoj da markoj. Grandkvante, certe tiu ĉi sumo estas eltirata el la poŝoj de germanaj laboristoj, sed samtempe estas metataj ĉiaspecaj baroj por la memstara laborista radiomovado.

Lerte utiligante la leĝojn, la poŝtministerio devige enigas membrojn de laboristaj kluboj en la ekzistantajn surloke burĝajn societojn de "amikoj de radio", rifuzante en mala okazo doni permesojn por la lampaj radio-akceptiloj. Lastatempe la ministerio permesis, kiel provizora rimedo, liveradon de ĉi permesoj al membroj de la laboristaj kluboj post ekzameno en speciala komisiono, prezidata de ŝtata oficisto, — post la ekzameno, havanta ekskluzivan celon ne allasi laŭeble laboriston al la radioamatoreco. Tio klaras jam el tio, ke "amikoj de radio" povas havi ekzamenon en sia societo, kie ĝi fariĝas certe fiktiva formalaĵo. Kaj

dume la laborista radioklubo ĝis la nuna tempo, malgraŭ la kelkfojaj petdeklaroj, ne estas rekonata de la oficialaj organoj, malkaŝe favorantaj al la burĝaj radio-unioj.

Tiamaniere la plena libero por la burĝaj "radio-amikoj" kaj ĉiaj malhelpoj por la vekiĝanta laborista radioamatoreco — jena estas la devizo de la germana poŝt-ministerio. Precipe malfacile estas en la okupitaj regionoj de Rejnlando, kie la "kulturaj konkirantoj" tute malpermesis radioakceptadon kaj ĉi malpermeso havas kiel sekvon multenombrajn arestojn kaj aliajn persekutojn kontraŭ la radioamatoroj.

Unuvorte, la batalo por forbaro de la etero por laboristoj estas farata tute malkaŝe, sed rezulte, certe, ankaŭ la laboristoj mem komencas kompreni la utilon de la malpermesita frukto. Jen kial lastatempe ĉi problemo estas ĉiuflanke diskutata en laboristaj rondoj kaj la entuziasmiĝo pri radiotekniko ne plu estas rigardata kiel sporto aŭ amuzo, ĉar sendube la radio fariĝas unu el la plej potencaj formoj de ideologia influo.

"El tiu ĉi vidpunkto la politiko de l' ministerio kaj la radiomonopolo en la manoj de burĝa socio" — skribas al ni prezidanto de la laborista klubo el Berlino, — "metas novajn pezajn ĉenojn sur la disvolviĝon kulturan de laborista klaso".

Tial la laboristaj radioklubоj komencis nuntempe la batalon por konkiri por si la rajton de memstara ekzistado.

Samtempe estas metata la postulo pri radika ŝanĝo en programoj de radio-disaŭdigoj, ĉar ili ĝis nun fakte priservis nur la burĝaron kaj estas tre malproksimaj laŭ sia enhavo de la konceptoj kaj interesoj de vastaj laborulaj tavoloj.

"Laboristaj radioklubоj, — komunikas la sama korespondanto, — metas antaŭ si la taskon utiligi radio-disaŭdigadon por elpaŝoj de laboristaj gvidantoj, verkistoj kaj artistoj."

29. marto 1925 estis organizita la unua konferenco de germanaj laboristaj radioklubоj, pridiskutinta la vicajn taskojn de laborista radioamatoreco.

Dum la konferenco estis klare evidentigitaj tiuj multenombraj baroj, kiuj estas metataj survoje al ĉi movado kaj rezulte aperis la ideo pri kreo de Laborista Radio-Internacio, trovinta sian esprimon en speciala manifesto. Kun granda plezuro ni notas tion, ĉar la ideo de laborista internacio logike elfluas ankaŭ el la tuta nia laboro.

Estus tre utile, se niaj sovetiaj kamaradoj, posedantaj germanan lingvon aŭ Esperanton, provus senpere korespondi kun germanaj k-doj kaj per tio meti la komencon de la internacia interligo de laboristaj radioamatoroj.

Kaj poste ne malproksima estas la permeso por la laboristaj send-stacioj mallong-ondaj kaj tiam, ni ne prokrastos utiligi tiun ĉi eblon de la senpera kontaktiĝo kun la frata laborista klaso de okcidento. Tiamaniere la Laborista Radio-Internacio fariĝos fakto efektiviĝinta.

*A. Vinogradov,* SAT-ano (5555).

Noto de la red. Estus bone, se niaj SAT-k-doj helpus organizi per Esperanto senperan korespondadon inter diverslandaj laboristaj radioamatoroj, samtempe enpresante en laborista gazetaro ĉi supran artikolon de k-do Vinogradov, unu el la aktivaj laborantoj kaj gvidantoj de laborista radio-movado en Sovetio.

## El parolado de k-do Kamenev okaze de ducentjara jubileo de Scienca Akademio Sovetlanda

(en Moskvo)

Dum jubileaj tagoj estis diritaj multe da salutparoloj. Al mi ŝajnas, ke ni agas ĝuste, se nian profundan respekton al la monda scienco ni substrekos per tio, ke tie ĉi, antaŭ la reprezentantoj de tiu scienco, ni sincere kaj ĝis fino rakontas pri niaj taskoj kaj nia laboro.

Ni ne bezonas ion kaŝi antaŭ tiuj reprezentantoj. Niaj celoj, kaj niaj metodoj ŝajnas al ni tiom altaj kaj tiom kunligitaj kun tuta historio kaj estonto de l' homaro, ke ni estas pretaj prezenti ilin al la juĝo de objektiva Scienco.

La scienco nun gastas ĉe socialismo. Ĝi gastas en la lando, kiu konstruas socialismon. Kia estas bazo, per kiaj metodoj ni ĝin konstruas, kiaj estas antaŭtezoj de nia konstruado?

Sciu do la reprezentantoj de nia Sovetlanda kaj monda scienco, ke en tiu ĉi afero ni sekvas ilian vojon. Ili sciu, ke en la bazo de nia laboro kuŝas iliaj metodoj.

Estas ili, la reprezentantoj de la monda scienco, kiuj dismetis je konsistelementoj antikvajn misterojn de naturo, ili forŝiris de tiu mistiko, kiu premegis kaj premegas la homaron, kovrilon de mistero, ili detruis ĉarmon kaj potencon de mistero sur la homaron, ili dismetis sunsistemon, sunradion, atomon.

Konfesu do la monda Scienco nin, komistojn, konstruantojn de soveta civito, siaj lernantoj kaj adeptoj. Ili ne timu, kiam, sekvante ilian vojon, ni dismetis civiton, dismetis kapitalistan societon, dismetis misteran kaj trompan kovrilon de milito.

Sekvante ilian metodon, ni dismetis civiton kaj, sekvante iliajn instruojn ne timi la veron, ni senvualigis civitan organizajon, organizajon de perforto de malplimulto super la plimulto. Ni analizis la kapitalistan socion kaj malkovris sekreton de ekspluatado de homo per homo, de plimulto de homaro per ĝia malplimulto.

Ni analizis la militon kaj malkovris en ĝiaj solenaj kaj falsaj signalvortoj: "defendo de nacioj", "defendo de patrujo", elmontron de interesoj de kapitalista areto, oferanta por siaj propraj celoj milionojn da laboristaj vivoj.

Oni nin malbenas pro tio. Oni nin proklamas krimuloj, malbonintenculoj, fundamentskuantoj, detruantoj de la baza ĉelo de civilizacio.

Nu, ĉu la reprezentantojn de l' scienco, ĝiajn plejbonajn reprezentantojn ne okazis same, ĉu antaŭ la antaŭjuĝoj kaj superstiĉoj de posedaj klasoj ne estis krimuloj, komplotuloj kaj rompuloj de la dia ordo Galileo, Ĝordano Bruno, Didro? Ĉu oni ne proklamis Skuantoj de la dia ordo Darvinon, Roberton Major?

Jes, ni estas kulpaj je kompleto kontraŭ ĉiuj malnovaj firmaĵoj. Jes, ni estas ribeluloj kontraŭ ĉiuj malnovaj superstiĉoj, sed ni fieras, ke ni apartenas al la grupo de tiuj krimuloj, kiuj portas la nomojn de Galileo, Njuton, Darvin, Laplas, Didro ktp.

Elrusigis *V. Lebedev (4696)*

## Impostoj en Sovetio

Sovetio estas regno de laboristoj aŭ pli vere de laboruloj.

Kiel ĉiu regno, ĝi havas regnan aparaton, nur la lasta defendas interesojn de laboruloj, kaj tial mono estas bezonata por diversaj elspezoj. Enspeza parto de Sovetia buĝeto konsistas el impostaj kaj neimpostaj enspezoj. Mi intencas paroli ion pri impostoj, kaj aliajn enspezojn mi ne tuŝos.

Impostoj ekzistas en burĝaj regnoj, kaj impostoj ekzistas en Sovetio. Oni povas laŭ tio opinii, ke inter burĝa kaj laborista regno preskaŭ ne ekzistas diferenco, tamen ni devas konstati, ke impostojn en burĝa regno kaj en la laborista neniam oni similigu, ĉar ili estas tute diversaj, certe ne laŭ nomo, sed laŭ tio, kiu pagas ilin — de unua flanko kaj de la dua — kiom multe regno kolektas impostojn, krom tio, gravan rolon ludas kiajn — rektajn aŭ nerektajn — impostojn ĝi kolektas. Ni bone scias, ke la plej malbonaj impostoj por laboruloj estas nerektaj impostoj, kiuj tre malpligrandigas ilian salajron malplibonigante ilian ekzistadon kaj samtempe preskaŭ ne premas je poŝo de burĝaro. Sciante tion, Sovetio laŭpove nerektajn impostojn iom post iom nuligas.

Bonan klarigon povas doni jena tabelo.

**Enspezoj laŭ buĝeto R. S. F. S. R.**

| Nomo de enspezoj | 1923/24 buĝeta jaro | 1924/25 buĝeta jaro | + pli − malpli |
|---|---|---|---|
| 1. Ordinaraj Enspezoj | % | % | % |
| a) impostoj . . . | 69,7 | 62,0 | − 7,7 |
| el ili nerektaj impostoj . . . . | 0,03 | 0,02 | − 0,01 |
| b) neimpostaj enspezoj . . . . | 30,2 | 36,9 | + 6,7 |
| 2. Eksterordinaraj enspezoj . . . . . | 0,1 | 1,1 | + 1,0 |
| Entute | 100 % | 100 % | |

Kiam ni konsideras la tabelon, ni povas konstati, ke nerektaj impostoj ludas en la buĝeto de R. S. F. S. R. tre kaj tre malgravan rolon kaj krom tio en 1924/25 buĝeta jaro ili estas malpligrandigitaj. Sovetio malpligrandigas eĉ rektajn impostojn. Kia buĝeto de burĝa regno entenas tian malgrandan kvanton da nerektaj impostoj? Nenia.

Mi scias, ke buĝeto de Cara Rusio en jaro 1913 entenis nerektajn impostojn 20,5 %.

De alia flanko estas tre grave scii kiu pagas impostojn, por prijuĝi tendencojn de regno. Ni scias, ke plimulto de loĝantaro estas laboruloj en ĉiu regno. Ni scias, ke nur laboruloj ĉion kreas, tamen ni scias, ke en burĝa regno laboruloj estas la plej premita parto de loĝantaro. Alian ni observas en Sovetio.

Jena tabelo bone montras al ni, ke en Sovetio, kies registaro estas laborista, laboruloj pagas impostojn tre malmulte.

| Nomo de kategorioj | Kiom proc. da impostoj pagas |
|---|---|
| Laboristoj | 8 |
| Nelaborulaj grupoj | 70 |
| Oficistoj, liberaj profesioj ktp. | 22 |
| Entute | 100 |

*B. Dzeton.*

## Ankaŭ la pruvoj de amikeco

Laŭ la gazetoj kaj certigoj de latvia registaro la interrilatoj kun Sovetio estas normalaj kaj la plej amikecaj.

La ĉefa komitato de latvia laborista sportularo SSS interkonsentis kun kelkaj rusaj piedpilkkomandoj aranĝi en Latvio konkuron. Tiucele post kelkaj tagoj devis alveturi Riga'on leningrada komando "krasnij Putilovec" kaj ĥarkova kombinita komando. Tamen la bona intenco de latvia sportularo iĝis neefektivigebla, ĉar la registaro rifuzis envojaĝvizon al leningradaj k-doj. La ĥarkova komando, kun brila sukceso juse konkurinta en Germanio, ne malpli surprizis la latvian sportularon, tamen ne per bela piedpilka ludo, sed per ricevita transitvizo sen permeso halti en Riga. Alveturinta el Berlino la 15. septembro ĥarkova komando, akceptata kaj akompanata de Riga'a policistaro de unu stacidomo al la dua, estis envagonigita por tuja forveturo Moskvon. La rusaj piedpilkistoj okaze de tiu stranga fenomeno sukcesis nur eldiri al reprezentantoj de la latvia sportularo laborista sian malkomprenon.

Estas nun interese, kion volis atingi la latvia registaro per sia, kun nenio pravigata ordono. Ŝajnas, ke sendanĝerecon de latvia respubliko neniel povus "ekŝanceli" ia sporta konkuro kun rusaj piedpilkistoj. La ĉefa komitato de SSS intencas esprimi sian proteston en la nomo de latvia sportularo laborista kontraŭ tia fiordono de la registaro.

La gazeto "Socialdemokrats" opinias, ke la registara ordono estas nekomprenebla, ĝi estas malutila al interesoj de la ŝtato kaj samtempe unuflanka kaj ridinda. Mi diros eĉ plu, ĝi ne nur estas ridinda, sed ĝi malhonoras la memestimon de la tuta laboristaro en "libera demokratia lando".

*Neŭtralulo.*

## 90 mortkondamnoj en Bulgario

Jam scias tuta mondo, ke en Bulgario okazis atenco je la 16. aprilo en katedralo skt. "Nedela". De tiam la burĝa registaro komencis sisteme persekutadon al maldekstraj elementoj. Ĉar la burĝa registaro kulpigis ilin, kiel iniciantoj de la atenco en la katedralo. Post la atenco la burĝa registaro ordonis, ke ĉiuj personoj kiuj apartenas al unuecfronto nepre devas esti arestitaj kiel danĝeraj homoj. Ĉu ili estas junuloj aŭ maljunuloj — ĉu estas virinoj aŭ viroj! Kaj urba estraro ordonis per la agentoj kaj policistoj, ke oni jam havas rajton aresti ĉiujn personojn kiuj ŝajnas dubaj, ke ili estas danĝeraj homoj. Sed la bulgaraj agentoj ne demandas, ĉu vi estas kulpa aŭ ne! Oni arestas rajte, vi ja nur estas laboristo, malgraŭ vi ne estas danĝera homo. Oni diras, en la nomo de la leĝo vi estas arestita, se vi kontraŭdiras, vi estas batita ĝis morto.

Preskaŭ en ĉiuj urboj kaj urbetoj, vilaĝoj kaj vilaĝetoj oni faris multajn arestojn inter laboristoj kaj kamparanoj. La laboristoj kaj kamparanoj estis taksitaj kiel danĝeraj homoj kaj malamikoj al nuna sociordo kaj al "patrujo".

Kaj ĉiuj estis juĝataj de milittribunalo kiel senditaj personoj de Moskvo kaj kiel malamikoj al burĝa registaro. Oni estis juĝata laŭ la leĝo, por defendo de la ŝtato. Sed kelkajn el ili, se la juĝistaro trovas, ke ili estas senkulpaj, oni liberigas. De tiam, tage kaj nokte la prokuroroj pripensas, kiuj povas esti mortkondamnitaj kaj kiuj kondamnitaj al malliberejo. Sed la prokuroroj pledas por mortkondamnoj preskaŭ al ĉiuj arestitoj, ekzemple kiel en Plovdiv. En la proceso oni juĝis 12 personojn, 6 el ili estis mortkondamnitaj kaj 6 personoj al malliberejo, kaj ĉie estas tiel.

"Jen kion ni legas en Plovdiva gazeto "borba" (batalo), en la numero 1306.

"Sofio, 24. aŭgusto. En reĝokorto nuntempe estas 90 mortkondamnoj kiuj atendas konfirmadon de la reĝo. Krom tio aliaj 60 mortkonfirmoj jam estas trarigardataj de supera milittribunalo kaj atendas konfirmon en certa limtempo.

Nur 19 mortkondamnoj ĝis nun estas resenditaj de supera milittribunalo por dufoja trarigardado al dokumentaro de malsupera milittribunalo".

Per tiu ĉi sciigo la tutmonda laboristaro jam klare vidas kaj bone komprenas, ke en Bulgario nuntempe regas "konstitucia registaro", kiu gardas la interesojn de la laboristaro. Kaj tutmonda laboristaro jam bone povas fari konkludon, ke la registaro mortkondamnas, nur se vi ne konsentas kun ili, sekve vi devas esti pendigota.

Sed la laboristaro devas scii, ke tiu ĉi cifero ne montras ĉiujn mortkondamnitojn, sed nur la oficialajn. Sed la bulgara laboristaro, klaskonscie kaj bone memoros pri la mortigantoj, kaj, venos la tempo, kiam respondas la laboristaro. Kaj tiam aliaj pendas sur la pendigiloj.

*Z.*

## ≡ DISKUTEJO ≡

### Kiu devas elspezi por eduki infanojn?

La artikolo de k-do H. Ponjatovskij presita en n-o 53 de Sennaciulo tre interesis min; sed ĉar en tiu artikolo temas nur pri elspezo, ŝajnas al mi, ke la titolo "Kiu devas eduki infanojn" ne estas tute taŭga. Unua demando estas *"kiu devas eduki infanojn"*, kaj alia *"kiu devas elspezi por eduki infanojn"*. Kompreneble estas ĉefe edukistoj kiuj devas eduki infanojn, sed estas nek edukistoj nek gepatroj, kiuj devas pagi por tiu edukado.

Ĉar tiu demando interesas multajn gekamaradojn el diversaj landoj, kaj ĉar la demando estas publike farita, ŝajnas al mi, ke ankaŭ la respondo ne devas esti privata afero, tial mi sendas ĉi-kelkajn liniojn al nia gazeto.

Mi nur deziras alporti ĉi-tie mian opinion — kiu ankaŭ estas tiu de la francaj revoluciemaj geinstruistoj — pri la demando: kiu devas pagi por infanedukado?

Do, ni opinias, ke la infanoj ne estas proprajo de siaj gepatroj, nek de iuj ajn aliaj personoj, sed ke ili estas proprajo de la tuta socio; tial estas la socio mem, kiu devas pagi por ilia edukado.

Ni opinias, ke infanoj estas proprajo de la tutmonda socio, tial principe estus dezirinde, ke la tutmonda socio mem pagu por ilia edukado; sed, kompreneble, ĉar ankoraŭ ne ekzistas tutmonda unueca sociordo, ni — ve! — ne povas esperi, ke ekzemple la tuta loĝantaro el Franclando bonvolos pagi por edukado de la infanoj el tutmondo, tiel kiel por la infanoj el Franclando mem.

Eĉ ĉar la kapitalistaj ŝtatoj preferas elspezi miliardojn por la militoj — ekz. la franca ŝtato por la milito en Maroko — anstataŭ pagi por la tuta edukado de l' infanoj, ni ne povas esperi, ke en kapitalistaj landoj la ŝtatoj bonvolos pagi por la edukado, nutrado ktp. de la infanoj sialandaj.

Escepto estas Sovetio. Ni opinias, ke proletaria ŝtato devas celi al pagado de ĉiuj elspezoj por la infanoj. Kompreneble ni ne asertas, ke soveta registaro *povas de nun* pagi ĉiujn elspezojn por la infanoj, sed ni opinias, ke ĝi devas celi al tio, kaj ni pensas, ke ĝi mem pri tio samopinias kiel ni.

En Franclando, ni ŝtatoficistoj, ricevas malgrandan pojaran sumon por kompensi la elspezojn kiujn ni faras por ĉiu el niaj infanoj. Ni penadas por ke tiu sumo estu pligrandigota. Sed ni opinias, ke la ŝtato devus pagi tiun sumon ne nur al ni sed ankaŭ al ĉiuj laboristoj.

Franca ŝtato pagas al patrino (laboristino) malgrandan sumon dum la unuaj monatoj post la naskiĝo de ĉiu infano (kondiĉe ke la patrino estu akceptata kiel estante malriĉa) sed tio nur celas pligrandigi naskiĝaron t. e. utili por la interesoj de la ekspluatantoj kaj de la imperialismo.

Ni opinias, ke pli granda sumo pomonata kaj poinfana devus esti pagata al gepatroj ĝis la 16. jaraĝo de ĉiu infano.

Mallongige mi esperas, ke soveta registaro pripensas la aferon kaj ke tial baldaŭe kiel estos ebla ĉiu laboristo el Sovetio ricevos unue pligrandigendan malgrandan pojaran sumon po ĉiu sia infano malpli jaraĝa ol dekses jaroj, atendante ke la proleta ŝtato povu pagi ĉiujn elspezojn por la infanoj.

La georfoj de la proleta klaso troviĝas en speciala stato. Koncerne Sovetion mi jam scias, ke Sovetŝtato pagas ĉiujn elspezojn por la georfoj el Sovetio. Sed mi opinias, ke la georfoj el tutmonda — almenaŭ revoluciema — laborista klaso estas propraĵo de tutmonda — revoluciema — laborista klaso — mem. Konsekvence mi opinias, ke ekzemple la georfoj de la orfejo titolita "Socia Venonteco" kie mi laboras kiel instruisto — estas propraĵo de la tuta revoluciema laborista klaso; tial mi pere de "Sennaciulo" sendis de nelonge alvokon al ĉiuj revoluciuloj el tutmondo por ke ili — mem pagu la elspezojn por tiuj georfoj kaj kontrolu la proletan edukadon, kiun ni disdonu al la georfoj, kaj la tutan organizadon de la orfejo. *Robert Soudant (140).*

## Promenoj kaj promenetoj sur marĝenoj de esperantaj gazetoj

### 22. Politiko kaj tekniko

**(Leganto kritika ne ŝajnigu sin malica — temos ne pri la tekniko politik-polica!**

El artikolo „Kontinenta politiko"(Heroldo de Esp-o, n-o 26) ni ĉerpas jenajn liniojn: „— Ĉu mi diru al vi, kiu potenco devigos finfine Eŭropon al unuiĝo? La *tekniko!*"

— Ĉu vi scias, ke ekzistas plano por *unueca elektrigado* de Eŭropo? Ke estus teknike eble elektre funkciigi ĉiujn fervojojn kaj industriojn de Eŭropo el ok centrejoj, el kiuj troviĝus ses en la Alparo kaj du en Skandinavio?

— Ne, tion mi ne sciis, sed ĉi tiu ideo emociigas min! Kia perspektivo por la eŭropa ekonomio!

— Kaj la eŭropa paco! Ĉar post ĉi tiu interligo de Eŭropo per malproksimenkondukiloj estus eŭropa milito teknike neebla . .

— Sed ne forgesu, ke la politika unuiĝo de Eŭropo estas nepra kondiĉo de ĉi tiu elektrigado!"

Jen la cirklo sorĉita: progresoj de tekniko povas unuigi Eŭropon, sed progresoj de la tekniko estas neeblaj sen antaŭa unuiĝo de Eŭropo! Estas facile tamen rompi tiun cirklon: socia revolucio en la tuta Eŭropo forigos la barojn por ĝia unuiĝo kaj sekve ebligos teknikan progreson.

*Alia ulo el Moskvo.*

**Ĉiujn sendaĵojn, kiuj koncernas la redakcion, oni adresu nur: "Redakcio de Sennaciulo", Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz (Germanio)**

## Popola instruado en Blankrusio

Pezan heredaĵon ricevis Blankrusio de cara Rusujo. Dudekoj da jaroj la blankrusia vilaĝanaro senindulge rusiĝis. En Blankrusio estis ne unu lernejo en parenca lingvo; kaj tiu ĉi parenca lingvo estis malpermesita. Cara regnaro tenadis vilaĝanaron de Blankrusio kiel en tuta Rusio en mallumo kaj malklereco. Anstataŭ lernejoj intense disvolviĝis drinkejoj kaj preĝejoj.

Dum la civila milito kaj pola okupacio konstruaĵoj de rusaj lernejoj estis transformitaj en kazernoj, bruligitaj kaj detruitaj, instruistoj dispelitaj. Polaj okupanoj tute detruis la lernaferon.

Ne estas mirinde, ke la procento de senalfabetuloj atingas en Blankrusio 60 %.

Kun grandaj malfacilaĵoj soveta Blankrusio komencis batalon kun detruaĵo de lernejoj.

Estas necese komenci de la novo la aferon. Oni devas rekonstrui ne la malnovan sed la novan lernejon, nacian kaj ne nur blankrusian, sed diverslingvan, atentante diverskoloran nacian konsistadon de Blankrusio.

Nun en la sfero de popola instruado, Blankrusio havas grandajn atingaĵojn. Je pasinta lernjaro en urboj lernis 92 % da infanoj de lernaĝo kaj en vilaĝaj provincoj 60 %.

La malsupera lernejo nun estas tute blankrusigita. Estis komencita blankrusigado de lernejo de la dua grado. La nombro de lernejoj kuntenas 4250 lernejojn kun 345 000 lernantoj. Sufiĉe grandan klerigon ricevis aliaj naciaj lingvoj. Nun funkcias 125 hebreaj lernejoj, en kiuj lernas 20 000 hebreaj infanoj, 145 polaj, en kiuj lernis 75 000 infanoj kaj 14 latviaj lernejoj.

La blankrusia popola komisarejo de instruado ellaboris la planon de ĝenerala instruado, diskalkulita en 10—15 jaroj. Sukcese staras la demando kun profesiteknikaj lernejoj kaj superaj lernejoj.

En Blankrusio estas 4 superaj lernejoj, universitato, 2 institutoj por agrikulturo, veterinara instituto, 3 laboristaj fakultatoj, 77 teknikumoj kaj profesiaj lernejoj.

Por 4 miliona loĝantaro Blankrusia tio en nunaj kondiĉoj estas pli ol sufiĉa. La superaj lernejoj jam ellasis kelkajn novajn grupojn de kvalifikitaj, inteligentaj fortoj el laboristoj kaj vilaĝanoj.

Profesiteknikaj lernejoj kaj teknikumoj iom post iom adaptiĝas al bezonoj de vilaĝanaro. En pli granda parto de profesiaj lernejoj, partiaj lernejoj kaj teknikumoj la instruado estas gvidata plene en blankrusia lingvo. En aliaj specialaj lernejoj jaro post jaro kreskas la nombro de disĉiploj en blankrusiaj lingvoj. Fine jam estas unu jaro, ke ekzistas instituto de blankrusia kulturo. — Supera scienc-kultura centro en Blankrusio, kiu helpas al klerigo ne nur al blankrusia, sed ankaŭ al hebrea kaj pola kulturoj. La signifo de instituto de blankrusia kulturo alte valoris ankaŭ por blankrusia emigracio.

Antaŭ nelonge estis ricevita el Praha deklaracio de grupo de konataj, blankrusiaj elmigrintoj, en kiu ili opinias instituton de blankrusia kulturo, kiel superan kulturan centron en Blankrusio.

En nuna jaro pro bezonoj de popola instruado en Blankrusio estas elspezita 28,7 % de regna buĝeto kaj 34,9 % de loka buĝeto. Iom post iom oni rekonstruas ĉiujn lernejojn, en kelkaj lokoj la kresko de lernejoj havas fabelan karakteron. Tiel en Zaslav-a distrikto, landlimo kun Polio estis antaŭ milito ne unu lerneja konstruaĵo.

Nun en tiu ĉi distrikto, malgraŭ ĝia malfacilega, ekonomia situacio troviĝas 55 lernejoj. Granda laboro estis farita en sfero de eksterlerneja instruado. En 658 punktoj je likvido de analfabeteco lernas preskaŭ 35 000 homoj.

En nuna jaro preskaŭ duoble grandiĝas la nombro de popolaj domoj kaj legejoj. Ĝia nombro atingas 600. Monato post monato pli grandiĝas la nombro de kluboj kaj bibliotekoj. Ĝenerale en distriktaj centroj estas pli ol 100 kluboj kaj bibliotekoj, nekalkulate komsomolaj kaj pioniraj.

La nova blankrusia buĝeto de 1925 ĝis 1926 jaro estas konstruata tiel, ke por popolinstruado estos donita ankoraŭ pli multe da rimedoj, ol en pasinta jaroj. Tio ĉi helpos ankoraŭ pli multe al disfloro de popolinstruado en Blankrusio.

Trad. *Kontorer.*

## Proteststriko per rifuzo de manĝaĵo

IRH — La politikaj enkarcerigitoj de la Lemberg-a esplor-malliberejo rekomencis la proteststrikon per rifuzo de manĝaĵo, ĉar iliaj postuloj ne estas plenumitaj. Por rompi la strikon la malliberejа administracio decidis, kontraŭ la ekzistanta regularo, transigi multajn esplorendajn malliberulojn al la karcero Wronki, kiu estas fame konata pro sia kruela reĝimo kontraŭ la politikaj malliberuloj.

## Juĝprocedo sen defendanto en Hungario

IRH — Por trankviligi la protestvokojn de la internacia proletaro, la Bethlen-registaro telegrafis la mensograporton al eksterlando, ke k-do *Rakosi* diris al sia defendanto, ke li tute ne estas turmentita, ke oni eĉ tre afable kaj humane interrilatis kun li. Sed nun anoncas sin la defendanto de k-do Rakosi, la juristo D-ro Zoltan Lengyel (burĝa advokato), kaj deklaras en ĉiuj burĝaj gazetoj, ke li ĝis nun tute ne vidis sian klienton kaj sekve ankaŭ ne jam parolis kun li. Li protestas, ke li ne jam ricevis la permeson enrigardi la kulpigan materialon, kaj ke oni pretendas de li defendon de akuzito, kiun li nur vidas la unuan fojon dum la unua tago de la juĝkunsido.

# DIVERSAĴOJ

## Pri la proceso de Dayton

Kiam kapitalistaj monopoloj aperis en Usono laŭforme de trustoj, maljuna Eŭropo opiniis: estas ankoraŭ invento de Usonanoj; ni ne havos similajojn.

Nu, estas apenaŭ tridek jaroj ke monopoloj naskiĝis, kaj ili regas en Eŭropo, almenaŭ tiom, kiom en Ameriko.

Pri la proceso de Dayton, kiu sin famigis antaŭ kelkaj tempoj, opinio de maljuna Eŭropo estas sama; Ameriko, ĝi imagas, estas funde lando de sovaĝuloj; ĝi estas ankoraŭ je nia mezepoko pri la ideoj; ĉe ni, maljunaj civilizituloj, tute prave ni ne timas havi Dayton-an proceson.

Tio-ĉi estas grava eraro: pri la proceso de Dayton, kiel kiam ĝi starigis la unuajn trustojn, la usona kapitalismo ne estas malantaŭe, sed antaŭ nia kapitalismo; ĝi montras al ni tion, kio okazos ĉe ni post kelkaj jaroj.

Ja, franca burĝaro returniras rapidege al kristaneco kaj al religia maltoleremo. Mi havas antaŭ miaj okuloj raporton pri unu el la lastaj kunvenoj de Geografia Societo. Tiu-ĉi estas societo el la plej "malvulgaraj"; ĝi konsistas nur el tiuj, kiuj inter franca burĝaro, metas sian fieron en "kulturo", en intereso pri la aferoj de intelekto. Nu, la 27. februaro de tiu jaro, dum ĝia kunveno, princo d' Altora Colona donis komunikon pri la grandaj afrikaj Lagoj, kaj li konkludis:

"Se la indiĝena naskiĝokvanto malpligrandiĝas, la registaro devas helpe partopreni *precipe* intensi evangeliigon, kaj akcesore impostante iom post iom poligamiajn familiojn . . . En Francio oni devas uzi la samajn rimedojn: *precipe* rekristanigon, ĉar la kaŭzo de l' malfeliĉego estas en la animoj, kaj, akcesore, lukti kontraŭ la malmoraleco, modifi la heredaĵajn leĝojn, favori al multenombraj familioj . . . Pro tio, en ĉiuj kolonioj, edukado de indiĝenoj devas esti transdonita al la klopodo de misiistoj . . ."

Nu, ne nur neniu el la aŭskultantoj protestis kontraŭ tiu strangeta maniero por civilizi nigrulojn . . . kaj Francojn, sed la speco pri la "rekristanigo" de Francio estis multe aplaŭdita.

Similaj faktoj estas ĉiam multnombraj. Ano el instituto, kies scienca valoro estas vere tiom maldika ol estas dika la librego de liaj publikigitaĵoj, tuj verkaĉis libraĉon por elmontri valoron de kristaneco. En asocioj de ekslernantoj de superaj, sciencaj lernejoj estas grupoj, kiuj ĉiujare farigas mesojn por siaj lernejaj kamaradoj, ktp.

Estus cetere malnorme se estus alie. Kiam burĝaro, revolucia klaso, portis la sorton de homaro, ĉie ĝi ardege forigis ĉion, kio kontraŭstaris la progreson, sed nuntempe, kiam burĝaro nur vivas kun trudema penso, ke ĝi povas esti senigita je siaj privilegioj de l' "monstroj", kiujn ĝi naskas, anstataŭ daŭre renversi barilojn, kontraŭe ĝi nur pensas starigi aliajn. "Kristanigo" de subpremitaj popoloj kaj "rekristanigo" de subpremitaj klasoj, estas por ĝi la plej bona barilo. Pro tio, ĝi ne hezitas restultigi sin mem, esperante kuntreni al stultiĝo tiujn, kiuj kutime imitadas ĝin.

Por tiu laboro, kompreneble, la intelektuloj staras ĉe la unua vico, ĉar ili estas kutimigataj alkuregi renkonte al la deziroj de siaj mastroj.

Se la kapitalo povas dum kelka tempo ankoraŭ regi, ne nur en Dayton, sed ĉie estos restarigitaj la inkviziciaj tribunaloj; la novaĵo estos, ke sendube estos la sinjoroj de instituto, kiuj plenumos la servon de grandaj inkvizitoroj.

*R. Louzon*
Esperantigis el "*Proletara Revolucio*"
Johano 1771.

---

## Gardu vin!

Ni ekscias, ke iuj individuoj kiuj ne aniĝis al SAT, aŭ ĉesis esti membro sed kiuj posedas SAT-jarlibron, ĝenas niajn membrojn pro petoj pri diversaj servoj, kies plenumado ofte kaŭzas gravan tempoeĉ mono-perdon al la petito. Kontraŭ tiuj senskrupuloj ni agu kiel decas: ni ĵetu fajren iliajn leteron.

Pri la korespondado inter SAT-anoj, ni konsilas al ĉi-tiuj citi sian membro-matrikulon, kaj konformiĝi al la artikoloj 34-35 de nia statuto.

---

## La 60-jara jubileo de J. Rainis en Riga.

La 12. septembro la social-demokrata partio festis la 60-an datrevenon de l' naskiĝo de konata Latvia proletverkisto kaj porliberecluktanto J. Rainis. La aranĝita festo iĝis granda demonstracio. La salonego de Riga'a metia societo belege ornamita per verdaĵoj kaj aro da ruĝaj standardoj de sur la balkonoj fiere salutintaj festanojn, estis plenplena. Ĉe apero de Rainis enirinta la salonegon kune kun sia edzino Aspazija (ankaŭ konata proletverkistino) la granda amaso da gastoj akceptas lin per muĝegaj kaj senfinaj ovacioj. Ĉe la enirejo la eminentan gaston kaj jubileulon atendis la honora gardantaro de sportuloj laboristaj kaj de junaj pioniroj okupiĝintaj ankaŭ pri la bona ordo. Dum Rainis direktiĝis al por li difinita loko trapaŝante la salonegon, la ĉeestantaro leviĝas kaj gejunularo ĵetas ruĝajn rozojn sub liajn piedojn. Post kiam la ovacioj malfortetiĝis, eksonis la marŝo de Meierber, plenumita de Riga'a simfonia orkestro. Sur la brusto de Rainis ruĝaj floroj. La feston malfermas, gvidas d-ro Paul Kalnin, parlamentprezidanto, kiu ankaŭ la unua varme alparolas jubileulon. Sekvas multaj alparoloj kaj salutoj de Latviaj proletorganizaĵoj, profunioj, partisekcioj kaj individuoj. Finas la feston koncerta programo.

*Neŭtralulo.*

## Grave!

### Letero al SAT-anoj.

Ni Blankrusaj esperantistoj komencis praktikan aplikon de Esperanto.

En n-o 15 de ĵurnalo "Profesia movado" (Проф'рух) organo de Centra Soveto de Profesiaj Sindikatoj B. S. S. R. estis enpresita artikolo "Kiamaniere ni povas ligiĝi kun eksterlandaj laboristoj". Kiel bona rimedo, ilo-ĵurnalo rekomendas Esperanton. Studenta ĵurnalo "Ruĝa Standardo" (Чырвоны Сьуяр) donas lokon por leteroj ricevitaj per Esperanto el eksterlandaj studentoj.

Vilaĝana gazeto "Blankrusia vilaĝo" (беларусская веска) konsentis presi en gazeto leterojn de vilaĝanoj eksterlandaj. Centra Gazeto "Stelo" organo de C. K. Komunista partio en B. S. S. R. enpresas niajn leterojn ricevitajn de vi karaj kamaradoj!

Supera Soveto de Fizika Kulturo en B. S. S. R. konsentis korespondadi per Esperanto kun Sportorganizaĵoj de l' tuta mondo (precipe Anglio, Ameriko, Ĉinio, Belgio, Hungario, Germanio, Francio)!

Ni petas, ĉiuj studentoj, laboristoj, prof. laboristoj, sportuloj, vilaĝanoj, junuloj k. a. skribu leteron pri sia vivo, situacio k. t. p. Sendu fotografaĵojn (ni pagos eĉ!) de viaj fabrikejoj, lernejoj, kluboj, Leninĉambroj, ekspozicioj ktp.

Sendu aŭ senpere al redakcioj aŭ pli bone (kun fotografaĵoj nepre) al: Oficejo de Internacia laborista interligo.

Adresoj de redakcioj:

*Minsk,* Soveckaja ul n-o 63, redakcija gazety "Zvezda" — gazeto "Stelo"

*Minsk,* Soveckaja ul n-o 63, al redakcija gazety "Belaruskaja Veska" — Blankrusia vilaĝo"

*Minsk,* Dom Truda Cen. Bjuro Proletstuda Kom. 10, redakcija ĵurnala "Ĉyrvoni Stjaga" (studenta) — "Ruĝa Standardo"

*Minsk,* Dom Truda, kom. n-o 9, redakcija ĵurnala "Profesianalnoje Dvijenije" — "laborista profesia ĵurnalo"

*Minsk,* Narkompros redakcija ĵurnala "Asjveta"

*Minsk,* Revolucionnaja str. n-o 21, instituto de Blankrusia Kulturo.

*Minsk,* Revolucionnaja str., Warkomzarav — Vysŝij Sovjet Fizkultury.

Nia adreso Minsk, Poŝtkesto 33, Blankrusia Oficejo de internacia Lab. interligo.

Memoru kamaradoj, ke de praktika uzado dependas viveco de nia lingvo, ĝia utileco al laborista klaso. Nur tuj ni ricevis konsenton de organizaĵo por scienca organizaĵo de laboro interkorespondadi kun alilandaj tiusamaj organizaĵoj esperante, kaj ricevi diversajn materialojn (uzu dume nian adreson!)

Skribu leterojn, tradukojn el viaj gazetoj kaj ne forgesu ĉiam skribi super la letero: "estas skribite *esperante*".

Komencu! Vi ĉiam ricevos respondon! Frate kaj Sincere!

SAT-anoj al laboro! *Dim. Snejko.*

# LASTAJ NOVAĴOJ

## Faŝista demonstracio tutgermania en Leipzig

La 17. ĝis 19. oktobro okazis en Leipzig naciista festo tutgermania. Partoprenis pli ol 80 000 iamaj militistoj kaj faŝistoj. La antaŭmilita "Germanio, super ĉio" dum tiuj tagoj ree esprimiĝis. En la interna urbo preskaŭ ĉiuj domoj estis ornamitaj per monarkistaj standardoj "nigroblankoruĝa". La respublikan standardon oni nur tre malofte vidis, preskaŭ nur sur la ŝtataj domoj. Kvankam en Germanio estas malpermesata porti armilojn la faŝistoj estis senescepte armitaj per tranĉiloj, revolveroj ktp. Multaj laboristoj provokitaj de la faŝistoj estas vunditaj, kelkaj eĉ grave.

Partoprenis la demonstracion la iamaj oficiroj kaj generaloj. Hindenburg kaj Ludendorff ne ĉeestis, eble ili timis ankoraŭ la Leipzig-an revolucian proletaron. La sekvantan fojon ili certe partoprenos. Ja tute nenio okazis al la partoprenintaj generaloj kaj oficiroj amasbuĉantaj dum la lasta popolbuĉado. Dimanĉon antaŭtagmeze okazis en Leipzig tri amaskunvenoj protestantaj kontraŭ la faŝista demonstracio. La kunvenoj estis plenplenaj. Post la kunvenoj formiĝis demonstracioj. Unu demonstracion atakis la faŝistoj kaj vundiĝis grave kelkaj proletoj.

La faŝista tago pasis. Ĝi montris al ni la minacantan naciistan evoluon, kiu ne nur la germanan, sed la tutmondan proletaron devas interesi. Ni lernu el ĝi kaj helpu kiel eble plej baldaŭ formi la proletan unuecfronton tutmondan.

La laborista movado tre bedaŭras la morton de Fred Bramlay, kiu estas cindrigita la 16. oktobro. Kiel sekr. de la Ekzekutivo de la Brit-Sindikataro li forte subtenis la unuiĝon de la rusa Sindikataro kun la I. F. T. U.

Komenciĝis persekuto de la K. P. brita per aresto la 15. okt. de 8 estroj pro ribelpropagando.. Kredeble ili malliberiĝos dum 3—6 monatoj. Sed "Jix" (Jiks moknomo de respondeca registarano) ĝis nun ne arestis senlaborecon — la plej fatala ribeliganto. La polico konfiskas la ĉi semajnan eldonon de la "Workers Weekly" (sem. lab. organo). La estroj nuntempe liberiĝas kontraŭ depono de garantia sumo.

En Tartu prepariĝos nova proceso por studentoj-proletoj, aranĝata de famaj "militjuĝejoj".

La 1. novembro en la minejoj de Tyssen pluraj miloj da ministoj estas maldungotaj. La limigadoj rilate al laboroj kaj laborista nombro okazis precipe en Dinslaken.

Laŭ gazetaro el Reggio vell' Emilia, ĉiuj faŝistoj, akuzitaj pro mortigo de l' socialista kandidato estas de la asizoj malkondamnataj.

## Amasarestoj en Dalmacio (Jugoslavio)

IRH — La jugoslava gazetaro raportas pri aresto de pli ol 400 laboristoj kaj kamparanoj en Dalmacio, kiuj estas akuzitaj pro aparteno al la kom. partio (lasta estas malpermesata en Jugoslavio). Kvincent personojn oni volas kondamni pro regna perfido kaj laŭ la leĝo pri la ŝirmo de la ŝtato, laŭ kiu la aparteno al ŝtatmalamika organizajo estas punita per dudek-jara karcero aŭ per mortpuno. La arestoj okazis kiel singarda rimedo por la dum tiu tempo atendita vizito de la jugoslava reĝo.

## Memmortigo en Germanio

Laŭ statistiko en Germanio de unu miliono da enloĝantoj mortas meznombre 206 per memmortigo. En la jaro 1922, do en la jaro kiu jam estis ombrita de la inflacio, en Germanio okazis entute 6362 memmortigoj.

## Balotsenrajtigo de la judoj en Rumanio

La rumana registaro ordonis, ke la balotlistoj por la sekvantaj balotoj en la komunumoj estu finitaj la unuan de oktobro. Estas konstatite, ke tre multaj judaj balotantoj ne estas registritaj en la listoj. Grandaj urboj kun juda plimulto havas ridinde malaltan nombron da judaj balotantoj; ekzemple Kiŝinev nombras 12 000, Ĉernoviĉ 11 500.

## Je memoro de la 400jara datreveno de l' kampulbatalo apud Böblingen 1525

(Daŭrigo)

La kampul-konsilistaro konsilas en la magistratejo de Weinsberg pri la pluraj faroj, akra interdisputado okazas inter Florian Gejer kaj la kampulgvidanto uzurpanta Götz de Berlichingen, ĉar la lasta volas indulgi la nobelojn kaj iliajn kastelojn, dum Florian deklaris: La sinjoroj ankaŭ ne bezonas pli ol unu pordon. Ĉiuj fortikaj domoj, ĉiuj tiranejoj de la kavaliroj devas esti renversataj. Ĉar nun la kampuloj ne ĉie agis laŭ ĝusta koncepto de Florian, ne rompis la potencbazojn de la feŭduloj, pro tio ili povis pli facile esti rejetataj en la malnovan servutecon. Ĉi interdisputado kaŭzis disiron de la "nigra aro" sub Gejer Fl. kaj "hela aro". Dum ili interdisputadas, kondukigas Jäklejn la kavaliron de Helfenstein kaj kunulojn al kampo antaŭ la urbo kaj peligas ilin tra lanca kordono. Melchior Nonnenmacher, la fajfisto de Ilsfeld, la ĝisnuna kortega muzikisto de Helfenstein, ludas ankaŭ ĉe tiu ĉi danco, sed kun ĝojo, laŭ melodio "venĝo por la 7000 de Wurzach". La grafino Helfenstein, kiu alvenis por peti indulgon por la grafo, estis metita sur sterkoĉaron kun la paroloj:

Sur ora ĉaro vi eniris Weinsbergon, sur sterko-ĉaro vi nun eliras.

Jäcklejn kaj la fajfisto nun kuniĝas kun sia trupo kun la kampuloj ĉe Böblingen. La Junkro G. de Waldburg[1]) komandas tie la ligan[2]) truparon. Unue la liga rajdistaro provas fari atakon, kiu ne sukcesis, ĉar en la mola tereno la ĉevaloj ne povas bone moviĝi, tio kaŭzis al ili malvenketon:

Jam ili estas unu kontraŭ alia: Ho Butler[3])
la situacio malbona estas.
Vidu, viaj rajdistoj la malamikan pugnon
sentas.
La Junkro rigardas zorgigite de malproksim'
la batalan sort',
Kian ili faras tie en la lagun', mi volus, ke
ili estus eliront'.
*(Wagner)*

Estas jam la 10-a matene, kiam komenciĝas la batalo, la kampulaj kanonoj bone laboras, pafas la ligan piedtruparon al forkuro. Jam dum 3. horo oni akre batalas, la situacio de la kampuloj estas bonega. La Junkro G. povas elmordi la dentojn ĉi-foje. Jen perfido, perfido. La urb-(vogto) kuratoro de Böblingen Leonhard de Breitschwert ŝteliras al la Junkro promesas al la liguloj malfermi la urbpordegojn, por tiamaniere izoligi la flankon de la kampula armeo. La liguloj marŝas kontraŭ la maisupran pordegon. La ĉi-tie gardantoj estis "kampuloj", kaj sendis al ili feran saluton. La liguloj forkuras. Ĉu Leonhard trompis ilin? 200 ligulaj pafistoj nun marŝas antaŭ la supra pordego, postulas eniran, minacas, okaze de rifuzo, bruligi virin- kaj infanaron. Ĉi-tie gardas "burĝoj" — kaj malfermas la pordegon. La ekster la urbmuroj troviĝanta kampul-, kaj metiularmeo nun subite estas pafitaj de malantaŭe. La bonajn poziciojn la kampuloj nun devas cedi, la sorto de la batalo estas fiksigita. La kampulvicoj ŝanceliĝas.[1]) La kampulomorto sin jetas sur la kampuloj.

"Fratoj, niaj alianculoj estas en danĝero, estus eterna honto, se ni volus malesperite, senkuraĝe hejmen iri, kaj nur tie renkontiĝi, kie okazas kermeso" alvokas[2]) Theus Gerber siajn Stuttgartajn kamaradojn. T. Gerber ankoraŭ lastmomente provis turnigi la batalsorton. La bravuloj sin jetas en la mortigan batalon, sed vane. La kampuloj forkuras, la liguloj sekvas ilin, riveregoj da kampula sango verŝiĝas sur la teron. La al arbaro rifuĝintajn kampulojn oni mortpafas kiel ĉasbestaĵon kaj birdojn, amaso da kampulkadavroj kovras la terenon, prirabita de la dungituloj.

(Daŭrigota) Kompilis: *H. N. (511).*

[1]) Truhses (Junkro Georg de Waldburg kastelo en supra ŝvabio, proksime de Fridrihshafen — Konstanca lago.

[2]) Schwäbische Bund, elp. Ŝvabiŝe Bund = Ŝvaba ligo = liguloj. Ligo de liberaj urboj, feŭduloj eklezia nobelaro, la pfalzgrafo (palatinulo) kaj je la kapo la duko de Bavario).

[3]) La kapitano de la liga rajdistaro.

[1]) Kampulmorto = masakrado je la kampuloj perdintaj batalon.

[2]) Theus Gerber meti-laboristo el Stuttgart, kiu venis kun 200 meti-laboruloj por helpi al kampuloj. Li jam ekkonis, ke la sorto de ambaŭ kategorioj dependas unu de alia.

# ≡ KRONIKO ≡

**Britio**

S-ro J. Henson, organizisto de Brita Marist-Sindikato (N. S. F. U.), aniĝis al esp. kurso en Londono kaj al B. L. E. S. La ŝipposedantoj ofte sukcesis laŭ lia sperto pro la lingva divido inter maristoj. Esp. speciale helpas ĉar martransporto estas internacia afero.

**Estonio**

*Tallinn.* En fino de septembro komenciĝis esp. kurso por presistoj, aranĝata de "Esp. sekcio de Tall. Presista Unuiĝo". Vizitadas dudeko da gek-doj. Ĉi kurso estas jam la dua, aranĝita de la juna esp. sekcio.

**Francio**

*Lyon.* Okaze de malfermo de 3 novaj kursoj la Esp-ista lab-grupo organizis propagandan feston kiu tute sukcesis. Pli ol 200 personoj respondis nian inviton kaj aplaŭdis koncerton kaj paroladon de k-do. Roux, kiu klarigis precize kial laboristaro devas uzi internacian lingvon por faligi la lingvajn barojn; tiel kapitalismo pli facile estos venkata. Alvokon al sennaciismo li faris. Pri tiu festo, la loka gazetaro raportis kaj la sukceso de l' kursoj estas certa.

Nia movado kreskas preskaŭ pli rapide ol ni volus. 300 grandaj afiŝoj anoncas niajn kursojn, kiuj komenciĝis la 15. okt. — K-do Roux paroladis publike kaj kreis esp. grupon en Grenoble (110 km de Lyon) kaj St. Etienne (58 km). Same k-do Nicollet en Firminy (70 km) — Le Chambon (64 km) kaj Cluny (40 km) de Lyon. Nia agadkampo estas vasta, ni laboras tage kaj nokte. — Laŭ nia klopodo estos almenaŭ 40 SAT-anoj en la jarlibro. Ni konkuras la Paris-ajn SAT-anojn. *H. N.*

Denove, ĉiuj k-doj kaj grupoj estas petataj noti, ke la sidejo de la grupo estas nun en la laborborso (Bourse du travail) 39, cours Morand, Lyon VI (Francio). Ĉiulunde okazas kunvenoj.

K-doj kaj grupoj de F. E. O. el nia regiono dezirantaj helpon por organizo de kunvenoj, mitingoj, kunvenoj ktp. povas sin turni al ĉi-supra adreso.

**Latvio.**

*Riga.* En duonmonata organo de Centra Unuiĝo de latviaj profsocietoj "Arodnieks" aperis propagandartikolo de k-do A. Kažoks. Estraro de l' sama unuiĝo decidis malfermi esp. kurson por laboristoj, kiun gvidos k-do A. Kažoks. senlaca pioniro de l' p.t.t. profesia kaj esp. movadoj, redaktoro de nacia esp. revuo "Ondo de Dangava".

*Liepaja.* Kvankam loka "Stradnieku Avize" (Laborista gazeto) jam daŭre enpresas tradukaĵojn el Esp. inter ili la grandan verkon "Faraono", tamen idistoj sukcesis enpresi en ĝi artikolon, laŭdantan Idon. Dank' al konvinka kaj lerta kontraŭartikolo de nia fervora S-ano Ed. Jaunvalks, idistaj asertoj estas detruitaj. La redakcio en sia postnoto konfesas la superecon de Esp. kaj ĝian gravan signifon por laboristaro. *D.*

**Ukrainio**

*Ĥarkovo.* La movado promesas por nuna jaro multajn fruktojn. Aprobitaj estis de la SEU kongreso: senpera interligo de l' lokaj organizaĵoj kun la ukrainia Centra Oficejo (Tutuk.), eligo de certa parto (10%) el kotizaĵoj, por utilo de ukr. esp. movado, eluzado de l' centra organo por la ofic. sciigoj de l' Tutuk. ktp. Siaflanke, Tutuk. nun ĉesas disdoni specialajn ukr. membrokartojn, nur varbante la anojn por SEU entute.

En la fino de julio aperis eldonita de Regna Eldonejo Ukraina lernolibro de k-do Volevič (6 presfolioj kun plena esp.-rusa radikaro).

Jus estas konfirmita la statuto de regnaj esp.-kursoj, gvidotaj de Tutuk., kun la specialaj fakoj en la entreprenoj kaj kluboj. En ilia plano estas ankaŭ preparado de Esp.-instruistoj. Krom tio, la fakto mem efikos dank' al notoj, disjetitaj en la tuta ĥarkova gazetaro, kiu estas legata en la tuta Ukrainio. — La ĵurnalo "Rabočij Klub" (Laborista Klubo), organo de Polit-Klerigo Administracio kaj de Sindikata Konsilo, sisteme prezentas siajn paĝojn por esperanta afero, lumigante ĉefe la demandojn pri enpenetrigo de l' lingvo en lab. klubojn kaj pri ĝia eluzado en laborista interkorespondado.

Sufiĉe efikis la vizitoj de eksterlandaj delegitaroj. Bedaŭrinde, la vizito de germ. laboristoj en Ĥarkovon koincidis kun la SEU-kongreso, kaj tial ne okazis la renkonto. Dum la vizito de l' Eduk-Internacio jam okazis konversacioj de niaj kamaradoj kun la eksterlandaj gastoj, kaj kelkiuj el niaj eldonejoj publikigis kune specialan alvokon al la delegataro en kvar lingvoj — inter alie ankaŭ en Esp. La vizitintaj nin dresdenaj lab. sportuloj, kontraŭe, mem turnis al ni kun peresperanta frateca saluto, kiu estos enpresita en la gazetoj. Ĝenerale, la ĥarkova gazetaro komencas atenti la movadon, kaj ankaŭ la organoj de l' Ukraina Centra Ekzekutiva Komitato ("Visty) kaj Partia Komitato ("Kommunist") aperigas ne sole notojn, sed tutajn artikolojn priesperantajn.

Sed la plej promesantaj por niaj estontaj sukcesoj estas kaj restas la celadoj, kiel en gvidanta centro de l' ukr. movado, tiel ankaŭ sur la lokoj, al *laŭplana* laboro kaj al reciproka *interligo.* Bedaŭrinde, ĉi-tendencoj ne estas ankoraŭ tute ĝeneralaj, sed oni povas atendi, ke prosperos al la centro plivivigi la lokajn org-aĵojn tie, kie ili ne estas ankoraŭ sufiĉe viglaj. Ĝuste nun estas disvastigata la unua cirkulero pri laboro de vintro.

En la laborplano por la plej proksima periodo (en Ukraina skalo) estas projektita organizo de *SEU-ĉeloj* en entreprenoj kaj aranĝe de senpera interligo de niaj entreprenoj kun la koncernaj eksterlandaj de l' sama produktado. Okaze de tio ni turnas nin kun speciala alvoko al laboristoj-esperantistoj. Ankaŭ ekzistas la intenco daŭrigi la eldonan agadon. Estas preparata ukrainlingva lernolibro, speciale por negramatikuloj; (por negramatikuloj sufiĉas "Petro" eldonita de SAT. Red.) projektita estas la eldono de ukrainlingva murgazeto; ekzistas ankaŭ la aliaj projektoj (parte jam proksimaj al sia efektiviĝo) sur kampo de vortara laboro.

La tuto permesas esperi, ke la movado en Ukrainio elpaŝas sur larĝan vojon. *Tutukano.*

## Originalaj esperantaj proverboj

Al kiu oni diras *estimata,* estas ofte sen estimo *ata.* — Pri la vero sonori, pri la vero dolori. — Ne en ĉiu puto same bona guto — ne en ĉiu kavo estas bona lavo. — Forlasante truon, mus' ne faru bruon. — Ne al ĉiu aĉo sekvas la malplaĉo. — Ne pri ĉiu aĝo diras veron la virino kun kuraĝo. — Virino ĉirkaŭbrakumita ne estas fortikaĵo ĉirkaŭmurumita. — Malmulte da musoj estas sen vosto, sed multe da viroj sen muskol', sen osto. — Hundo vibrigas la voston pro la ĝojo, virino la langon pro la kutimo. Pro la ĝojo oni plezuras, kutimo la ĝojon mezuras. — Hundo senvostigita restas la hundo, lango al virin' perdita ŝanĝas ŝin el fundo. — Ne ofte la saĝo patras pri la frazo, brue verŝita el sub la nazo. — Ne ŝtopu per frapo truon en la kapo. — Truon en la senco ŝtopu per la ŝerco. — Ne dormu la ĝojo kaŝe en la koro. Suno donas la ĝojon, sed la geamantoj serĉu ĝin en la ombro de kaŝejo. — *F. V. Arbetaro.*

## Alvoko

Tut-Ukrainia komitato de SEU intencas ebligi la grandskalan interligon de ukrainia laboristaj amasoj kun la eksterlandaj kamaradoj laŭ principo de produktad-identeco. Eble la evtl. adreslibroj de naciaj Lab. Esp. Asocioj donas materialon tiuspecan. Tial ni petas afable ĉiujn (ekstersovetiajn) LEA'jn havigi al ni po 1 ekz. de iliaj adreslibroj (se eĉ pagoŝarĝe). Ankaŭ ĉiu loka SAT-peranto estas afable petata ĉi tie al ni almenaŭ 10 numerojn de SAT-anoj el sia loko, nepre notante la specialecon kaj, se eble, la entreprenon; nome, ni deziros por ĉiu loko 1 adreson de PTT'aro, 1 de instruisto kaj po unu laboristo el 8 instruistejoj diversspecaj. Ni penos iamaniere rekompenci kamaradojn per ukrainiaj esp-aĵoj.

Ni kredas, ke la tutmonda laboristaro aŭdos nian vokon. Sendu laŭ adreso: Ukraino, Ĥarkov, VUK SERK, poŝt. skr. 244. *Tutuk SEU.*

PRESEJO: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG (GERMANIO)